nia voĉo

madrida esperanto-liceo marto 2026

## RESUMO DE LA ĜENERALA KUNVENO DE MEL

Kiel anoncite en pasinta numero, Madrida Esperanto-Liceo (MEL) okazigis sian ĝeneralan kunvenon la 2an de februaro. La ĉeestintoj diskutis kaj aprobis raportojn pri: la evoluo de la membraro, la financa raporto 2025, la agad-raporto de la pasinta jaro, la buĝeto por 2026, la jarkotizoj 2027 (kiuj restas senŝanĝaj, je 12 eŭroj) kaj la agad-programo por 2026.

Oni renovigis la estraron de la asocio. Fakte, la ĉefaj postenoj restas senŝanĝaj, kun nur la eniro de Ana Manero kiel voĉdonanto, anstataŭe de Manuel Parra. Plu restas kiel prezidanto de la klubo Félix Jiménez Lobo, por la sekva deĵorperiodo.

Memoru ke por aliĝi al MEL sufiĉas ke vi plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es. La kotizo estas nur 12€ jare.

## NOVAĴOJ DE LA SOMERAJ KONGRESOJ EN HISPANIO

Fine de marto fermiĝos la rabatita aliĝperiodo por la 84-a Hispana Esperanto-Kongreso 2026, kiu okazos en Portugalete (Biskajo) en julio. Jam 80 homoj aliĝis. La LKK informis ankaŭ ke malfermiĝis la ebleco aliĝi al la programitaj ekskursoj kaj al la fina bankedo. Ni memorigas ke pliajn informojn oni povas trovi en la adreso: https://kongreso.esperanto.es/, kun la aliĝilo kaj la listo de aliĝintoj.

Ankaŭ progresas la organizado de la kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), kiu okazos en Leono depost la 19-a de julio, tuj post la hispana kongreso. Vi povas vidi la ĉefajn informojn en la speciala retadreso: https://sat2026leono.org/. Tie troviĝas jam ankaŭ la skizo de la programo, kiu havos kiel bazan temon "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito". ATENTU: la rabatita aliĝkotizo finiĝas ĉikaze la 28-an de februaro.

Memoru ankaŭ ke la 82-a Internacia Junulara Kongreso de Esperanto (IJK) okazos ĉijare en Katalunio, konkrete de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2026 en kongresejo situanta en la urbeto Tiana, nur 15 km for de Barcelona. Tiu estos mirinda ŝanco por partopreni internacian etoson, ne nur por junuloj. Kaj oni eĉ povos ĝui esceptan naturan fenomenon: la sunan eklipson kiu estos videbla en la nordo de la iberia duoninsulo la 12-an de aŭgusto. Vidu pliajn detalojn ĉe la retejo https://ijk2026.tejo.org/.

## EN LA TELEVIDO




La programo de la televida konkurso "El precio justo" en kiu aperis Esperanto-grupo estis elsendita la 20-an de februaro.

La peco en kiu Mario Wenceslao konkursis kaj parolis pri Esperanto kaj la grupo estas spektebla en la retejo de Telecinco ĉe la adreso: https://mallonge.net/telecinco (kun ĉeftitolo: «Un concursante de 'El precio justo' sorprende a Carlos Sobera con su idioma creado: 'La gramática es muy personal'»), kaj ankaŭ en la Bitoteko de HEF ĉe: https://bitoteko.esperanto.es/xmlui/handle/11013/7678.

## MEMORU ALIĜI AL LA LIBERAJ EKZAMENOJ DE ESPERANTO EN UNED

Ni plu memorigas ke ĝis la 31-a de marto eblos enskribiĝi en la "liberaj" ekzamenoj de niveloj A2, B1 kaj B2 en UNED (Universidad Nacional de Educación a Distancia). Ili ebligas ricevi

la saman atestilon kiun studentoj akiras trapasinte la respondajn lingvokursojn de UNED. La ekzamenoj okazos de majo ĝis junio. La aliĝo al libera ekzameno kostas 80 eŭrojn kaj ne postulas hispanan civitanecon aŭ studentecon en alia ajn programo de UNED.

Vidu detalojn ĉe: https://mallonge.net/UNEDlibre.

## PRELEGOJ EN PASINTA FEBRUARO

Javier Vílchez prelegis pri Esperanto la 5-an de februaro en la Biblioteko Iván de Vargas de la ĉefurbo. Vidu apude foton de la evento.

La dimanĉon 22an de februaro je la 11a matene, samideano Fráncel Briel prelegis pri Yumeiho-terapio, kaj montris praktike la teknikon.

Vidu sube fotojn de ambaŭ eventoj.





## MADRIDAJ ĈIMONATAJ RENKONTOJ

Memoru ke la sidejo malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, ĉimonate kun antaŭvidataj vizitoj. La lundon 2-an de marto la terapiisto Fráncel Briel denove parolos pri Yumeiho-terapio kaj praktike montros ĝin al interesatoj.

Samideano Karlo, usonano el Teksaso, venos al Madrido de la 8a ĝis la 11a de marto, kaj pretas renkonti samideanojn. Li probable ĉeestos la lundan renkonton de la 9-a. Li loĝis en Madrid dum la okdekaj jaroj en Moncloa.

La unuasabata kunveno okazos la 7-an de marto, je la 18:30, denove ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metrostacio Alsacia).

## PLIAJ INFORMOJ

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

Ankaŭ eblas aliĝi al la ŭacapa grupo, por la madridaj esperantistoj, per la ligilo https://chat.whatsapp.com/C7XLCX9tNt28M50g3qxH1g.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo *Bluesky*, vi trovos nin en la adreso: https://madridaliceo.bsky.social.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com